

Johann Wolfgang von Goethe,

Same

*tradukita de Pejno Simono*

Super montopintoj —  
silent',  
tra pinoplingoj  
la senvent'  
spiras sen fort';  
arbare la birdoj ekmutas.  
Pretu, aludas  
silento pri mort'.

*Traduko de la Germana poemo  
"Ein Gleiches (Wanderers Nacht-  
lied)" de JOHANN WOLFGANG VON  
GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-  
22) en Esperanton de PEJNO SI-  
MONO (Simon Edward Adrian Pay-  
ne, \*1941-12-23).*

Arg-356-1974 (2014-03-14  
14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en  
[http://eo.wikipedia.org/  
wiki/Goethe](http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe).

Johann Wolfgang von Goethe,

Super montoj re-  
gas kviet'

*tradukita de Poul Thorsen*

Super montoj  
regas kviet',  
tra l' foliaro  
nur ventet'  
spiras kun trem'.  
Birdoj arbare silentas,  
se vi atendas,  
pacas vi mem.

*Traduko de la Germana  
poemo "Ein Gleiches (Wande-  
rers Nachtlied)" de JOHANN  
WOLFGANG VON GOETHE  
(\*1749-08-28 – †1832-03-22)  
en Esperanton de POUL  
THORSEN (\*1915-01-07 –  
†2006-01-30).*

Arg-356-708 (2010-05-28  
21:34:24)

*Poul Thorsen estis dana Espe-  
rantista poeto, kiu verkis mul-  
tajn originalajn kaj tradukitajn  
poeziaĵojn en la Internacia  
Lingvo. Vidu ankaŭ: [http:  
//www.poulthorsen.dk/  
kaj \[http://www.  
liberafolio.org/2006/  
forpasis-poul-thorsen/  
view\]\(http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view\).](http://www.poulthorsen.dk/)*

Johann Wolfgang von Goethe,

Egalaĵo (Noktokanto  
de migranto)

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Super ĉio iĝas  
Kviet',  
Kaj ne moviĝas  
Pro ventet'  
Iu foli';  
Silentas la birdoj ĉirkaŭe.  
Atendu – baldaŭe  
Ripozos vi.

*Traduko de la Germana poemo  
"Ein Gleiches (Wanderers Nacht-  
lied)" de JOHANN WOLFGANG VON  
GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-  
22) en Esperanton de MANFRE-  
DO RATISLAVO (Manfred Retzlaff,  
Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde,  
Germanio, \*1938-11-04) en 1983-  
01.*

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-  
20 14:44:12)